7-a JARO, N-o 315

LEIPZIG, 16. / 10. 1930



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerĥner, Kolmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS SEMAJNE

KIO OKAZOS EN GERMANIO

La rezulto de la lasta baloto donis okazon por viglaj diskutoj. Dum la lastaj semajnoj oni ĉie konversaciis, en fabrikoj, ĉe stratanguloj, en la hejmoj pri la sama temo: "Apenaŭ kredebla la sukceso de la nacisocialistoj! Tian rezulton mi ne atendis, kvankam mi konsciis, ke la faŝistoj havas multajn simpatiantojn eĉ inter la laboristaro. La fihomoj!"

Fakte la lastaj balotoj estas nekompareblaj kun iuj antaŭaj. En 1928 voĉdonis por la "Nacisocialista Germana Laboristpartio" ĉ. 800 mil elektrajtaj personoj — en 1930 pli ol ses milionoj esprimis sian fidon al la kandidatoj de tiu ĉi partio. Do anstataŭ 12 estonte 107 faŝistoj influos la decidojn de la regna parlamento.

La redaktoroj de la lab. gazetaro estis tiom konsternitaj, ke ili en la unuaj artikoloj tute forgesis insultadi k kalumnii, kia estas ilia metodo kontraŭbatali la faŝismon. La burĝaro balotis por Hitler — tio estas la kerno de ĉiuj artikoloj k la sola konsolo de l' gvidistoj por si mem.

Sed por ni estas valore konstati, ĉu la nekontraŭdirebla sukceso de la germanaj faŝistoj havas signifon favoran aŭ malfavoran? Kiu profitos pro la venko de l' nacisocialistoj, la kapitalismo aŭ la socialismo? Nu, kompreneble la kapitalismo! opinias la homoj, kiuj akiris sian scion pri la nacisocialista partio nur per artikoloj k paroladoj de niaj eminentaj gvidistoj.

Sed ĉu tio nepre ĝustas? Antaŭ la balotoj la burĝaj partioj presigis afiŝojn k grandformatajn gazetanoncojn kun la averto: Ne balotu por la nacisocialista partio, ĉar ankaŭ ĝi estas marksisma! Kontraŭe la nacisocialistoj asertas, ke ili k nur ili estas akraj malamikoj al marksismo, k vere la pasinta balotagitado estis kvazaŭ duelo inter socialdemokrata k nacisocialista partioj. Dum ĝi ludis gravan rolon la vorto marksismo, ĉar la nacisocialistoj kunigis ĉion malkontentigan en la nuna sociordo k donis al ĝi la terminon marksismo. Laŭ iliaj pamfletoj la marksismo kulpas pro: malvenko dum milito — packontrakto de Versaj — ĉiuj lastatempaj koruptskandaloj — altaj impostoj — senlaboreco — riĉiĝo de laboristaj gvidistoj k sklavigo al germana proletaro ktp. Ĉiam sekvis la konsilo: Se vi volas forigi la marksisman marĉon, liberigu vin k vian nacion — balotu por la partio, kiu sola kontraŭbatalas la marksismon, la hebreismon. Tio estis la esenco de ĉiu agitado nacisocialista.

Estas ne sen intereso por ni esplori, el kiuj popolpartoj devenas la anoj k simpatiantoj de l' t. n. faŝista partio. Multaj el niaj artikolverkistoj kontentiĝas pri tio, ke la laboristaj partioj sukcesis balotigi por siaj kandidatoj ne malpli da elektrajtuloj ol antaŭe k elvokas triumfe: La marksisma fronto staras firme k neŝancelite.

Mi rigardas la situacion de alia vidpunkto. Ni ĉiuj scias, ke la kapitalistaro laŭnombre konstante plimalmultiĝas. En Germanio dum la lastaj jaroj milionoj da mezklasanoj proletiĝis k tiu ĉi evoluo ankoraŭ ne finiĝis. Tion kaŭzis parte la malvenko en la mondmilito, sed ĉefe la ekonomia evoluo, la trustiĝo k raciigo en la industrio. Tiuj homoj konscias, ke ili estas degraditaj, sed nur malmultaj el ili volas kompreni, ke ili neniam plu povos ludi la rolon en la socio, kiun ludis iliaj prapatroj. Ili baraktas kontraŭ la por ili terura ekkono, ke ne plu estas grava diferenco inter la organizita proletaro, kies agadon ili malŝatis, k ili mem, la "pli bonaj homoj". Vanto malhelpas al ili forigi ĉiujn antaŭjuĝojn k enviciĝi en la fronto de tiuj, kiuj posedas nenion krom sia laborforto. Ĉar tiuj homoj spertis, kiom senpovaj estas la etburĝaj partioj kontraŭ la grandkapitalo, tial ili serĉis helpon ĉe aliaj partioj. La laboristajn ili konas nur supraĵe, ĉefe laŭ artikoloj pri ili en burĝaj gazetoj k laŭ la manifestacioj, kiujn ili abunde aranĝadas, sed kiuj tute ne havas varban karakteron. Almenaŭ iamajn mezklasanojn oni tute ne povas influi per manifestacioj. Ankaŭ la nacisocialistoj trovis la vojon al iliaj koroj ne per manifestacioj, kiujn ili okazigas, sed per lertega agitado.

Ĉiel ili provis senkreditigi k kulpigi la parlamentan regsistemon k akre kritikis ĉiun agon de la ĝisnunaj ministroj en internaj k eksteraj aferoj. Ili kredigas, kvazaŭ la nuna mizero estus sole en Germanio k ĉi tie estiĝis nur, ĉar la popolo estas devigita akcepti la packontrakton de Versaj k plenumi la sekvintajn pagoplanojn. Oni ignoras, ke ankaŭ aliaj ŝtatoj kun evoluinta industrio ne povas solvi la problemon pri senlaboreco kun ĝiaj sekvoj por la tuta ekonomio. Kiel estus solvebla la nuna financa k ekonomia dilemo ĉi tie, pri tio nenio certa estas dirita k — la amaso ne cerbumas pri tiu ĉi manko. Efektive trovis laŭtan eĥon la devizo de la nacisocialistoj: For la parazitojn en registaro k parlamento — ni postulas diktatorecon!

Por ke neniu ricevu la impreson, ke en la partio estas nur mezklasanoj, kiuj revas pri reveno de antaŭmilitaj cirkonstancoj, mi emfazas: La uniformitaj nacisocialistoj, la t. n. *ataktaĉmentoj* en sia plimulto konsistas el *laboristoj;* eĉ senlaboruloj ne malabundas. Se ruĝfrontanoj (komunistoj) agis laŭ la devizo ofte menciita antaŭ kelka tempo: Batu la faŝistojn, kie ajn vi renkontos ilin — nu, tiam *nur proletoj interbatalis*, vundis k eĉ mortigis unu la alian.

Kio logis laboristojn fariĝi faŝistoj?

Mi menciu nur la plej gravajn kaŭzojn: Ekonomiaj avantaĝoj; malamo kontraŭ hebreoj; ĝojo pri uniformo k militista ludado; malestimo al gvidistoj precipe el la socialdemokrata partio pro ilia konduto dum burĝaj festenoj; naciemo. — Antaŭ kelkaj jaroj multaj senlaboruloj povis ricevi bone pagatan laboron en grandaj fabrikoj, se ili aniĝis al la partio nacisocialista. Multaj entreprenistoj dungis prefere tiajn laboristojn, kiujn rekomendis distingaj lokgrupanoj. "Kies panon mi manĝas, ties kanton mi kantas."

Antaŭe la nacisocialistoj volonte konigis programon, kiu enhavas kelkajn punktojn, kiuj direktiĝas kontraŭ kapitalismo; sed ne kontraŭ tiu sistemo ĝenerale, nur kontraŭ la eksterlanda k *juda* kapitalismo, kiun oni titolis *premeganta;* kontraŭe la germanaj entreprenistoj k posedantoj reprezentas la *kreantan* kapitalismon. Tia difino trovis multajn kredantojn.

Ĉio malbona en la mondo laŭ ili devenas de la judoj, kiuj ne laboras, kiuj nur ekspluatas k diboĉas, kiuj perfidadas la alirasajn gelaboristojn k trompadas ilin, ĉar judoj konas solidaron nur inter si. Tiaj argumentoj estas *tre efikaj,* ĉar la germanoj ŝajne heredis antipation kontraŭ hebreoj. En antaŭbalotaj faŝistaj flugfolioj oni povis vidi diboĉantajn laborist-gvidantojn frakvestitajn kun incitaj tekstoj, por ke la proletoj ne plu sekvu ilin. Pri naciemo k emo al uniformoj mi ne bezonas skribi: en ĉiuj landoj la homoj estas pli malpli influataj de tiaj inklinoj.

Kiel kontraŭagis la laboristaj partioj? Mi jam diris, ke anstataŭ diri la veron, ili preferis mensogi, kalumnii k insulti pri la nacisocialista partio k ĝiaj celoj. Konsekvence ili devis alvoki la popolon ne viziti kunvenojn, en kiuj oratoras faŝistoj. Tamen la amasoj ne lasis sin deteni, k tiel okazis, ke por eniri kunvenojn aranĝitajn de nacisocialistoj, oni devis aĉeti enirbiletojn jam kelkajn tagojn antaŭe. Tiu partio okazigis antaŭ la baloto 34 mil kunvenojn en tuta Germanio, k en afiŝoj anoncantaj tiujn kunvenojn troviĝis la frazo: "Hebreoj ne estos enlasataj!"

La popolo vigle diskutadas pri la surpriza balot-rezulto, k tute kontraŭ la opinio de l' ĵurnalistoj la simplaj proletoj havas la konvinkon, ke ni staras antaŭ intercivitana milito. Certe estas, ke la tutan *estontan politikon difinos la nacisocialistoj.* Por ili ekzistas du ebloj: aŭ ili regos en Germanio kun aliaj burĝaj partioj aŭ ili sabotos (fuŝos) ĉiujn parlamentajn laborojn k fine forigos la registaron k parlamenton, anstataŭigante ilin per diktatoro.

Se ili regos kun aliaj burĝoj, la situacio ne estos alia ol se ili nomos diktatoron. La Turingia ekzemplo pruvas tion. Tie la tuta registaro vole nevole aprobas ĉiujn agojn de Frik (*Frick*), ministro por internaj aferoj. Laŭplaĉe li maldungas respublikanajn oficistojn pedagogajn, policajn k administrajn k anstataŭe instalas nacisocialistojn. Oni povas vere rekomendi lin kiel imitindan modelon al ĉiuj gvidistoj de lab. partioj, kiuj emas regi kun burĝaj ministrokolegoj. Faŝistaj ministroj havas la komision ne cedi al la alitendencaj koalicifratoj, k ili plenumas, fidelaj al la partio, la komision; sekve regule cedas la aliaj k tiel la nacisocialistoj atingas preskaŭ same multe ol se ili solaj estus respondecaj pri ĉiuj faroj de l' registaro.

La lasta parlamento devis disiĝi antaŭtempe, ĉar en ĝi ne troviĝis plimulto por aprobo de novaj impostoj, kiuj ŝarĝus la senhavan amason. Ankaŭ alia burĝa registaro povos proponi nur la samajn aŭ similajn impostojn, k la nacisocialistoj bone scias tion. Tial, ruzaj, ili postulas por si ĉefe la postenon de armeministro k, kiel en Turingio, tiun por internaj aferoj. Konsciante, ke la popolo ne kontentiĝos, ili klopodos estri la armeon k policon por povi subpremi eventualajn ribelojn.

Kelkfoje en lastaj monatoj proletoj estis tre severe juĝitaj k restos dum multaj monatoj en malliberejoj. Ili partoprenis kunvenojn aŭ manifestaciojn, dum kiuj okazis interbataloj kun polico aŭ mortigoj al alipensantaj proletoj. Tiaj okazoj, kiuj malhelpas unuiĝon de l' tuta proletaro, espereble estonte evitiĝos. La kulpajn gvidistojn, kiuj havas avantaĝon el tiaj malpacaj renkontiĝoj inter samklasanoj, neniam trafas puno. Ĝojinde nun vekiĝas inter proletaro la sento, ke oni nenion atingas, se oni brulegigas la malamon kontraŭ alitendenca *laborfrato.* La devizo: Batu la faŝistojn, kie ajn vi renkontos ilin! nun ne plu estas kriata, k strange — pri neaŭdo de tia fidevizo hurlas verkistaĉoj en *neradikalaj* gazetoj.

En nacisocialista tendaro mem ribelis la proletoj k ne plu emas blinde obei ĉiun ajn eksoficiron, kiaj estas multnombraj en la gvidistaro de l' nacisoc. partio. Jam antaŭ la balotoj, en Berlino k aliloke, la opozicio, t. e. la sinceraj klaskonsciaj (?) proletoj ribelis kontraŭ Hitler, la idolo de l' germanaj faŝistoj. La Hitleranoj devis aperigi novajn gazetojn, ĉar kelkaj antaŭaj troviĝis en manoj de l' opoziciuloj, kiuj uzas ilin por publikigi tute ne flatajn sciigojn ankaŭ pri la konduto de l' partigvidistoj, per kiuj la popolo ekscias, ke la diferenco inter diverstendencaj gvidistoj ne estas tiom granda ol la diferenco inter gvidistaro k simplaj sampartianoj.

Nun granda parto el la popolo estas preta subiĝi iun ajn diktatorecon, sed nur por havi esperon, ke io estos entreprenata, kio fine ĉesigos la teruran staton de necerto k garantios al ĉiuj labor-eblon.

F. Zehrer (6732).

KARLO MARKS PRI HINDIO (Fino. Vidu antaŭan n-on)

Mi scias bone, ke la anglaj industriistoj volas provizi Hindion per fervojoj en la sola celo, per malpli da kostoj eltiri el ĝi la kotonon k aliajn krudmaterialojn necesajn por iliaj manufakturoj. Sed post kiam vi unuan fojon enkondukis la maŝinon k la lokomotivon en lando, kiu posedas feron k karbon, estas al vi neeble ĝin teni aparte de la fabrikado. Vi ne povas konservi liniaron da fervojoj tra grandega lando, ne enkondukante ĉiujn industriajn procedojn, kiujn necesigas la tujaj k kurantaj bezonoj de l' transportiĝo per vaporo, k el kiuj eliros la aplikado de l' maŝinismo al la industribranĉoj, kiuj ne estas en senperaj rilatoj kun la fervojoj. La fervojoj estos do vere por Hindio la antaŭkurantoj de l' moderna industrio. Tio estas tiom pli certa, ke, laŭ la britaj estraroj mem, la hinduoj estas speciale taŭgaj por lerni la kondukadon de maŝinoj. La pruvo pri tio estas vaste liverita per la kapablo k lerto, kiujn manifestas la indiĝenaj maŝinistoj ĉe la Monfabriko de Kalkuto, kie ili estas laborigataj depost jaroj ĉe vapormaŝino, ankaŭ kiel tiuj, kiuj estas ligitaj al pluraj vapormaŝinoj en la baseno de Hurdvar, k ankaŭ alie. S-o Kembl (*Campbell*) mem, kiom ajn influita li estas de la antaŭjuĝoj, kiuj cirkulas pri la Kompanio de Hindio, estas devigita konfesi "ke la granda amaso da hinduoj posedas grandan *industrian energion,* ke ĝi estas plene taŭga por akumuli kapitalon, ke ĝi estas rimarkinda per la matematika klaro de sia pensado, per sia talento por la scienco de nombroj k por ĉiuj ekzaktaj sciencoj". "Ilia inteligento, li diris, estas rimarkinda". La moderna industrio, konsekvenco de l' fervojoj, fordetruos la heredan labordividon, sur kiu baziĝas la hinduaj kastoj, tiuj ĉi baroj absolutaj al la progreso k la potenco de Hindio.

Ĉio, kion la angla burĝaro estos devigata fari, realigos nek la emancipon de l' amaso de la popolo, nek la materian pliboniĝon de ĝiaj sociaj kondiĉoj, ĉar ĉi tiuj dependas ne nur

de la disvolviĝo de l' produktofortoj, sed de ilia alproprigo fare de la popolo. Sed tio, kion la angloj ne malplenumos, estas meti la *necesajn materiajn premisojn* por tiu ĉi emancipo k tiu ĉi pliboniĝo. Ĉu la burĝaro iam faris ion alian? Ĉu ĝi iam realigis progreson ne trenante la individuojn k la popolojn en la sango k la koto, en la mizero k la malnobliĝo?

La hinduoj kolektos la fruktojn de l' novaj soci-elementoj, kiujn disvastigas inter ili la brita burĝaro, nur, kiam en Granda Britio mem la nunaj regantaj klasoj estos trudanstataŭitaj de la industria proletaro, aŭ kiam la hinduoj mem estos fariĝintaj sufiĉe fortaj por sin liberigi komplete de la brita jugo. Ĉiuokaze, ni povas certe atendi vidi, en pli malpli malproksima estonto, la rekreiĝon de tiu ĉi granda k interesa lando, kies amindaj loĝantoj, eĉ tiuj de l' plej malsuperaj klasoj, estas, por apliki la esprimon de l' princo Soltikov, "pli sagacaj k pli lertaj ol la kimroj"; ilia submetiĝo mem estas kompensata per mieno de nobla trankvilo; ili mirigis, malgraŭ sia natura senenergio, la britajn oficirojn pro sia maltimemo; ilia lando estis la fonto de nia lingvo k niaj religioj; ili reprezentas la tipon de l' antikva ĝermano, kun siaj *kŝatria*-oj[1], k tiun de l' antikva greko, kun siaj bramanoj.

Mi ne povas forlasi la temon, ne konkludante per kelkaj rimarkoj.

La profunda hipokrito, la denaska barbareco de la burĝa civilizo montriĝas en niaj okuloj, de kiam ni ilin deturnas de la metropolo, kie ili sin vestas per respektindaj formoj, por rigardi al la kolonioj, kie ili en plena nudo elmontriĝas. Ili estas la defendantoj de l' posedrajto, sed ĉu iam revolucia partio efektivigis agrarrevoluciojn similajn al tiuj de Bengalio, Madras aŭ Bombe? Ĉu, por apliki esprimon de tiu granda ŝtelisto, lordo Klajf (*Clive*)[1] mem, ili ne turnis sin, en Hindio, al kruelaj trudelpremoj, kiam la simpla produkto de ilia korupto ne sukcesis kontentigi ilian rabegemon? Dum ili belparoladis en Eŭropo pri la nerompebla sankto de l' publika ŝuldo, ĉu ili ne konfiskis en Hindio la dividendojn de l' raĵahoj (princoj), kiuj estis investintaj siajn privat-ŝparaĵojn en valorpaperoj de la Hindia Kompanio? Dum ili kontraŭbatalis la Francan Revolucion je la preteksto defendi "nian sanktan religion"; ĉu ili ne malhelpis, samtempe, la kristanismon esti predikata en Hindio, k, por tiri monon el la pilgrimoj amase alfluantaj la templojn de Orisa k Bengalio, ĉu ili ne fariĝis la negocistoj pri mortigo k prostituo, plenumitaj en la templo de Djagernat[1]? Tiaj estas la homoj de la "Posedrajto", de l' "Ordo", de la "Familio" k de la "Religio".

La detruaj efikoj de l' angla industrio rilate al Hindio, lando tiel vasta kiel Eŭropo, ampleksanta 60 milionojn da hektaroj, estas sendiskutaj k eksterordinaraj. Sed ni ne devas forgesi, ke ili estas nur la rezultoj organikaj el la tuto de l' produktosistemo, tia kia ĝi estas starigita hodiaŭ. La produktado baziĝas en ĝi sur la absoluta superregado de l' kapitalo. La kuncentrigo de l' kapitalo estas esenca, por ke la kapitalo povu ekzisti kiel sendependa potenco. La detrua influo de tiu ĉi kuncentrigo sur la mondmerkatoj montras nur, je giganta skalo, la organikajn leĝojn esence proprajn al la ekonomi-sistemo nuntempe valida en ĉiu civilizita urbo. La burĝa historiperiodo havas kiel taskon krei la materiajn bazojn por nova mondo: unuparte, interrilatoj universalaj fonditaj sur la reciproka interdependeco de l' diversaj partioj de l' homaro, kiel ankaŭ la rimedoj por realigi tiujn ĉi interrilatojn, k, aliparte, la disvolvo de l' produktopovo de l' homo k la transformo de l' materia produktado en sciencan superregadon super la naturaj fortoj. La burĝaj industrio k komerco kreas tiujn ĉi materiajn kondiĉojn por nova mondo, en sama maniero kiel la geologiaj revolucioj kreis la tersupraĵon.

[1] Militista kasto.

[1] Angla generalo de l' 18-a jarcento, kiu konkeris Bengalion. Pruvita kulpa pri trompaj profitoj, li memmortigis sin.

[1] Hindua diaĵo kun sangokulto.

Vi ne bezonas esti riĉulo

por subteni vian sovetian K-don, kiu dezirus plue ricevi "S-ulo"-n, sed mem ne havas la eblon pagi la abonprezon.

Abonu por li! Abonigu por li ĉe via SAT-rondo farante tiurilatan proponon! Pagu al

Administracio de SAT!

Memoro je la 15-a de julio en Vieno

(Daŭrigo. Vidu n-ojn 312, 313)

La socialdemokrata laborista respublika defendligo ne povis multnombre servi tiun fatalan tagon, ĉar granda parto el ĝiaj anoj estis inter la laboristoj, kiuj manifestaciis. Tamen la malgranda aro, kiun oni ankoraŭ sukcesis kolekti, faris verajn heroaĵojn de sinofero k helpo. Ili penetris en la brulantan justecpalacon k savis tiujn samajn policistojn, kiuj, kiel estas pli antaŭe dirite, tute senbezone, kvazaŭ por pasigi la tempon, senĉese pafis el la interno de la palaco al la fratoj de la liganoj, je risko de l' propra vivo.

Kiam ili estis en la fumanta palaco, ili donis al la policanoj siajn proprajn uniformojn, faris al ili bandaĝojn, por ŝajnigi ilin vunditaj, kondukis aŭ portis ilin el la palaco tra flanka pordo. Krom tio, meze en la kuglofajfado, ili transportis vunditojn, inter ili ankaŭ multajn policistojn en la hospitalojn.

Je la dektria k duono posttagmeze regis ĉie la plej granda trankvilo. La tumulto estis jam de longe pasinta. La homoj ne faris ion malbonan, ili staris k rigardadis scivoleme, kiel la granda justecpalaco bruladis. Post multaj vanaj klopodoj la defendliganoj sukcesis la dekkvinan fojon, trarompi barikadon k ebligi al la fajrobrigado la alveturon antaŭ la palacon k komenci la estingon de l' fajro.

La sanitaruloj de la elektrolaborista defendligo transportis ankaŭ 18 vunditajn policistojn en la hospitalojn. Laŭ ilia petego ili iris la duan fojon en la brulantan palacon, por forporti de tie vunditajn policistojn. Kaj nun oni atentu, kian dankon la defendliganoj ricevis de la policistoj: Ĉi tiuj atendis, ĝis la vunditaj kolegoj estis forportitaj k poste pafis salvon mezen en la defendliganojn, el kiuj 11 personoj mortis! Ĉu ekzistas vortoj en la homlingva vortaro por brulsigni tian fiecon?

Antaŭ ol doni pafilojn al la policistoj, ties superuloj metis ilin rekte en sangebriiĝon, rakontante malverojn pri kruelaĵoj de la manifestaciantoj kontraŭ la policistaro. Jam en la tagmezaj horoj oni rakontis en la policejoj, ke 13 policistoj estis mortigitaj, ke 60 policistoj estus vivbruligitaj en la palaco, ke oni pendigis policistojn sur arboj, ke oni detranĉis la nazojn al ili, kastris ilin. Malgraŭ tio, antaŭ ol la policistoj komencis la perfusilan amasbuĉadon, *eĉ ne unu sola policano estis mortinta!*

Kiam la fajrobrigado ekagis, ĉio estis finita, k se la policistoj estus volintaj, ĉio estus restinta trankvila k neniu alia homa vivo estus endanĝerigita aŭ mortigita. Sed bedaŭrinde *la policistoj volis murdi ĉiuokaze, nepre* k per la jam citita mortigo al 11 defendliganoj komenciĝis neeldireblaj kruelaĵoj. Braŭntal *(Braunthal)* pritraktas en sia libro kelkajn el amasego da tiaj. Mi tradukas ilin laŭvorte. Ĉiuj estas rakontoj de okulatestintoj, kiuj donis siajn nomon k adreson. Jen la okazintaĵoj:

Je la deksepa posttagmeze — delonge jam la tumulto estis for — aro da

Kiam granda socia revolucio estos ekposedinta la produktojn de l' burĝa epoko: la mondmerkaton k la modernajn produktrimedojn — k estos subiginta ilin al la komuna kontrolo de l' progrese plej antaŭaj popoloj, tiam nur la homa progreso ĉesos simili tiun ĉi malbelegan idolanan dion, kiu volis trinki la nektaron nur el la kranioj de buĉitoj.

LA KLASBATALO TRA LA MONDO

Situacio k rajtoj de laboristoj en Italio

La oficiala nombro da senlaboruloj estis je 31. julio 342 000, t. e. 141 000 pli ol antaŭan jaron samdate. Tiun nombron oni devas almenaŭ triobligi por havi ĝustan statistikon. La silkindustrio estas la plej trafita: dum du monatoj la nombro da okupitaj laboristoj falis de 65 000 al 38 000. Tiu pliiĝo de senlaboreco validas por ĉiuj industribranĉoj, escepte la teksindustrio. Laŭ burĝa itala gazeto en provinco Mantovo oni komencis apliki la sistemon de pago per naturproduktoj al terkulturaj laboristoj. Tio rekondukas nin al la feliĉa epoko de l' primitiva ekonomio; la pagmaniero estas "aplikata" al la laboristoj: tio signifas kompreneble, ke oni ne demandis ilian konsenton. La italiaj laboristoj ne eĉ havas plu la rajton diskuti, ne nur pri la sumo, sed eĉ pri la formo de l' salajro. Kiel oni scias, la lab. salajroj en Italio estas plej malaltaj en tuta mondo. La tiea laboristo produktas trionon pli ol lia angla kamarado, dum lia salajro estas nur la duono. Li produktas je 80% pli ol rusaj laboristoj k ricevas nur 70% de iliaj salajroj.

Timo pro la sekreta gazetaro en Italio

La sekreta gazetaro disvastiĝas pli k pli de tago al tago, malgraŭ la nekredebla organizado de spionsistemo k sovaĝo de l' specialaj tribunaloj. Malgrandaj folioj velenaj, presitaj, kelkfoje maŝinskribe multobligitaj aŭ eĉ manskribitaj, cirkulas, avide atendataj, de mano al mano. La sugestoforto de tiuj folioj, kiujn maltrafas la akra atentemo polica, estas tiel granda, ke ĝi elvokas ofte manifestaciojn interne de fabrikoj, pri kio la gazetaro devas silenti, sed kiuj impresas registaron k industriistojn. La faŝista mastra unuiĝo kontraŭagas siaflanke per cirkuleroj sendataj al siaj membroj, atentigante pri la danĝero de tiaj manifestacioj k petante subpremi ilin per ĉiuj rimedoj.

Italia.

Politikaj kondamnitoj en Bolivio

La anarkista gazetaro raportis pri 9 mortkondamnitoj en Bolivio. Sed dume ŝanĝiĝis en tiu lando la registaro, la diktatoron Siles anstataŭis nacia milit-diktatoreco. La decido pri la sorto de l' kondamnitoj restas en la manoj de l' novaj regantoj. Temas pri juĝitoj, kiuj ribelis en j. 1921 kontraŭ estraro de komunumo, mortigis la estron kun familio k kelkajn najbarojn pro uzurpado de grundo k devigo al tro alta impost-pago. Gvidanto en tiu ribelo estis la nun 90-jara profesoro Faŭstino Blanki. Akuzitaj estis 246 personoj. En j. 1927 okazis kondamno je 5 jaroj da mallibero al kelkaj akuzitoj; post apelacio tiu decido estis nuligata k okazis kondamno je mortpuno por F. Blanki k pluraj aliaj akuzitoj. Naŭjaran martirecon jam suferis tiuj K-doj k montris senriproĉan sintenon en la karcero. Urĝas postuli liberigon al tiuj kondamnitoj per la laborista solidaro!

J. Lopez.

Strikoj en Ĉinio

Strikoj okazas en Ĉinio malgraŭ subpremo k malpermeso de Kuomingtang-registaro. En ĵurnaloj oni ne sciiĝas pri tiuj okazoj, ĉar la cenzuristo de l' registaro ne allasas ilin. Jam pasintjare okazis striko de l' laboristoj de "Water Supply" k de l' tramo en la franca urbkvartalo de Ŝanĥajo, kiu malsukcesis pro la perforta interveno de Kuomingtang. Ĉi-jare ree la tieaj laboristoj strikas jam tre longe (pli ol monaton). Kiam, en 21. julio, la strikantoj kolektiĝis en sia kunvenejo, centoj da armitaj oficistoj kun armita veturilo ekpafis. Fine estis unu mortigita k 10 laboristoj vunditaj k malliberigitaj. En alia loko estis arestitaj 24 grave vunditaj personoj. La nombro da strikantoj estas 1600. Malgraŭ la protestoj de l' sindikatoj en Ŝanĥajo, la franca policestro k la posedantaro malakceptis la postulojn je plialtigo de salajroj k plibonigo de laborkondiĉoj. Responde la entrepren-

---

policistoj en la aleo de Ringstrato ĉe la tramvoja turniĝo, antaŭ la konstruo de *Stadtschulrat* (lernejfaka estraro) pafis al la promenantoj. Viro, kiu en tiu momento volis transiri Ringstraton, falis trafite. Laŭte li kriis je helpo. La Ringstrato estis malpleniĝinta je homoj, ĉar ĉiuj estis forkurintaj pro la pafado. Sole la helpvokanto kuŝis en la strato. La policistoj demetis la pafilojn, staris kun pafiloj ĉepiede, sed rajona[1] inspektoro, kiu staris kovrite malantaŭ arbo k apartenis al la policistaro, alpretigis denove la pafilon, celis al la krianta vundito k pafis je li. La vundito mutiĝis, la kuglo frakasis la postkranion.

Denove la konstruo de la lernejfaka estraro. Post la "dispelo" de l' homoj per la salvo, aliaj kolektiĝis tie denove, ĉar en la ejo de *Stadtschulrat* sanitarejo estis lokita k scivolemuloj rigardadis la transporton de la vunditoj. Estis la deksepa k duono posttagmeze, duonhoro post la lasta salvo. Aro da policistoj denove lokiĝis en Ringstrato, rekte antaŭ la konstruo de *Stadtschulrat*. Ĉiam, kiam la disŝiregitaj homaj korpoj estis portataj en la konstruon, laŭtiĝis vokoj de indigno. Jen, subite polica inspektoro mansignis k denove salvo trafis en la homojn. La bone celita kuglo de la polica inspektoro, kiu pafis genuflekse, trafis la junan laboriston Bruno Peiska en la dorson. Li mortis ankoraŭ la saman tagon pro interna sangelfluo. Al pliaĝa homo pafo en la postkapon frakasis la kranion. Junulo, trafite de enkora pafo, subite mortfalis. Iu homo estis pafita en la renojn, alia en la kolon.

Bartenŝtajngase, je duono post la dekkvara. Aro da piedirantaj policistoj estis barinta k "puriginta" (seniginta je homoj) tiun strateton. La amaso forkuris en *Stadiongase*. Bartenŝtajngase estis en tiu momento malplena je homoj. Jen, forkuris kelkaj homoj en Stadiongase al Lastenstrato. Jen la polica baro en Bartenŝtajngase faris fusilan pafadon en la flankon k dorson de la forkurantoj. Por havi protekton, tri homoj sin kaŝis malantaŭ ŝtonetara amaso, ĉe angulo de Stadiongase k Lastenstrato. Unu el tiuj tri subite leviĝis, ĵetis sian jakon for de si, malkovris la bruston k flanken ŝovis surbruste sian ĉemizon, vaste disetendante la brakojn en plej alta ekscitiĝo, vokante: "Pafu je mi, se vi kuraĝas!" Jen, efektive, kvazaŭ ĝi estus laŭordona fusilado, la polica baro pafis salvon je la homo. Ĉi tiu, de kelkaj kugloj trafite, mortfalis. (Daŭrigota.)

[1] Subdistrikta. — *Red.*

LA NOVA EPOKO

Monata literatur-scienca revuo de SAT prezentas en sia

oktobra kajero

fragmentojn el "La Ĝangalo" de Sinkler (U. Sinclair) k "Mi bruligas Parizon" de Jasienski; krome originalan rakonton de EMBA k orig. versaĵon primilitan de 11 199.

La unuopa kajero kostas 0,35 mk.g.

Ĉiu literatur-amanto abonu al la nova jarkolekto de nia Revuo!

ADMINISTRACIO DE SAT, LEIPZIG O 27.

istaro decidis la maldungon al pli ol 100 laboristoj. Laŭ oficiala statistiko okazis en Ŝanĥajo dum julio jenaj strikoj: 1. En internacia loĝkolonio trifoje, 800 strikantoj; 2. en franca loĝkolonio dufoje, 930 partoprenintoj; 3. en ĉina regiono dufoje, 5680 strikintoj. (INO)

NI VIRINOJ K LA MODO

Ĉu la proletaj virinoj devas imiti ĉion, kion postulas la modo? Multajn aprobindajn akirojn ja alportis al ni la modo: ĝi liberigis nin de la malsaniga malvasta malkomforta vestaĵo, ekz. altaj kalkanumoj, altaj kolumoj, longaj haroj ktp. Avantaĝojn, rilate al la vestaĵo, kiujn ĝis hodiaŭ ne havas la viroj, ni jam posedas dum kelkaj jaroj. Sed — nur malmultaj proletaj virinoj estas finance tiel fortaj, ke ili povas imiti ĉion, kion postulas la diino "modo". Tial nur la bonon k belon ni imitu, ne la malprudentan reiron al la malsanigaj vestoj.

Pripensu, K-dino, kiu kreas la modon? Efektive ne proletaj virinoj, nur la burĝinoj k grandkomercaj direktantoj. Ĉu ili ne staras sur tute alia bazo ol ni? Burĝaj ideoj, burĝa kulturo k sociordo. Ĉu ni volas tion? Ni havas la taskon k volas mem krei propran socialisman kulturon.

Se ni nur imitus ĉion, ĉu bonan aŭ malbonan, ĉu belan aŭ malbelan, ni tiel aprobus tion, kion tute klasfremdaj personoj al ni montras. Ne imitante stultaĵojn de la modo, ni havu la kuraĝon nur gardi tion, kio estas saniga, bela k komforta. Estas sufiĉe da proletaj virinoj en la mondo, kiuj unuigite havus la potencon reteni saĝajn aŭ forpuŝi stultajn, malsanigajn akirojn de la modo, kiu estas nuntempe la esprimo de freneza, degenerinta kapitalisma mondo.

Mi alvokas la klaskonscian proletinon ne imiti ĉiun stultan modnovaĵon. *2019, Hallein.*

KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA LERNANTO"

Proletaria Kantaro

La elekto de la kantoj, ilia proleta tendenco, ilia internacia valoro, la fakto, ke ĉiu povas studi kaj kanti ilin dank' al la muziknotoj zorge presitaj, faras el tiu volumo unikan verkon, kiaspeca ne ekzistas ĝis nun en iu nacia lingvo.

Prezo: 2,50 mk. g.

Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27

SE VI ESTUS RIĈULO...?

Plaĉas al mi imagi, ke abunde riĉa onklo bedaŭrinde mortos en — nu, ĉar mi estas germano, do la kompatinda riĉulo devos morti en Ameriko. Domaĝe pro li, sed mi ne povas ŝanĝi. Bonhazarde li heredigos al mi unu milionon da dolaroj. Cetere, per tiu ĉi bonokazo mi tre facile povus heredi 10 milionojn, sed evidente mi estas modesta, tre volonte mi kontentiĝos pri unu. Tiu ĉi feliĉiga sorto ne trafos min nepreparite. Ĉar mi ĵus streĉe cerbumis pri tiu afero, ĉiuj rezultaj necesoj jam estas ordigitaj plej bone.

Mia unua ago estus malbagateleme ĝiri centmil dolarojn al SAT por sanigi la asocian financstaton ĝisfunde. Due, mi donacus privattraktoron baptinte ĝin: "Sukcesu!" al Sovetio.

Kiu emas opinii min ŝerculo, li pruvu, ke li pravas! Plue mi scias bonegan lokon apud la Elbo. Altaj tilioj ombrumas florkovritan herbejon. Tien, en la ombron de l' tilioj mi konstruigus simplan dometon, modestan, sed tamen aranĝotan komforte k oportune. Tie tre verŝajne mi gajnus ĝojon per miaj pasioj (laborista, liberpensula k esperanta movadoj) k per miaj amatoraĵoj: pentri, muzikaĉi k verki etajn diversaĵojn.

Do kvazaŭ kaŝita filistro? mi ekteruriĝas k malkonfesas ĉion!

Nun iom pli serioze dirite, mi pensas, ke neniu estas kompetenta por aserti ion tiurilate, escepte se li jam riĉiĝis. Kiu homo sin konas tiel ĝisfunde, ke li ne povus erari? Riĉo kondukas en novan medion. Kiu kapablas antaŭtaksi la efikon de la nova medio al si mem?

Do ĉiuj supozoj koncernaj estas projektoj, bonintencoj, hipotezoj k restas — revoj. Kiucele?

Willy Riedel (16 652)

BABILONO FILOZOFA

Sub tiu titolo raportas la angla gazeto "The Universe" (La Universo) pri kongreso filozofa en Oksfordo. Partoprenis 500 filozofoj el tutmondo (inkluzive Sovetio, Japanio k Ĉinio). La kvanto da temoj estis proks. 100, ĉefe pri etiko, moralo, metafiziko k pri historio de filozofio. Kiel raportas la angla gazetaro, la kongreso distingiĝis per dissonado okulfrapa. Konsiderante la ĥaosan staton de l' moderna filozofio en si mem, "The Universe" neniel estas mirigita pri tio.

Sed io alia: La diskutoj malfaciliĝis pro multo da lingvoj! Oni ja tradukrecitis la paroladojn ankaŭ en kvar ĉeflingvoj (angla, franca, germana k itala); tamen diskuto komuna preskaŭ estis neebla. La neceso pri lingvo internacia evidentiĝis kun insista forto. Pro tio "The Universe" proponas, ke la filozofoj uzadu la lingvon *latinan.* (!) Se ankaŭ la latino ne plene sufiĉus por esprimo en filozofio moderna, ĉe tiaj kongresoj la uzado komuna de l' latina lingvo tamen devus rezultigi sendube sukcesojn pli bonajn ol la nuntempa "Babilono filozofa".

— Do ankoraŭ latinon anstataŭ esperanto inter logikaj mondsaĝuloj! Ĉu necesas ajna komento? *Ajo, 15 455*

Lingva demando por komencantoj

Esperanta prefikso "mal-" estas unu el la plej spritaj elpensoj de d-o Zamenhof. Dum enkondukaj paroloj al kursoj mi ŝatas per ĝi ilustri, kiel esp-o solvis la problemon pri la radikaro. Ankaŭ por la aŭskultantoj ĝi ŝajnas sprita k facile komprenebla.

Sed kiam venas la tempo por studi la prefikson, montriĝas, ke ĝi ne estas tiom facile lernebla, kiel tio ŝajnas unuavide. Preskaŭ ĉiam komence oni tradukas la vortojn "malbona", "malbela" per "nebona", "nebela".

Tia eraro estas tute natura, ĉar ja en la naciaj lingvoj ne ekzistas la reliefa kontraŭmeto de la maloj, sed nur la neo. Tial nur post ioma streĉo de atento oni kutimiĝas al ĝusta komprenо de la facila k logika prefikso "mal", kiu estas ne negativa, sed pozitiva.

Same okazas rilate al sennaciismo.

Nia proleta esperantista tendenco pleje akordiĝas kun la interesoj k spirito de la laborista klaso. La novuloj tuj aplaŭde ĝin akceptas. Ja ĝi estas komprenebla facile por ĉiu laboristo: jam Marks k Engels diris, ke la proletaro ne havas patrujon[1]!

Sed kiam venas la tempo precize difini, kiel oni komprenas la sennaciismon, ofte la samaj novuloj diras, ke ĝi estas nur revolucia internaciismo.

Tia eraro estas tute natura, ĉar ja en la naciaj socioj ne ekzistas la medio, kie oni povus krei konkretan sennaciecon, sed eblas nur kritiki per internaciismo malavantaĝojn de laŭnacia diseco. Tial nur post ioma eksternacia praktiko per la lingvo internacia oni povas kompreni la veran enhavon de la vorto: sennaciismo, kiu estas ne negativa (internaciismo: neŝovinismo), sed pozitiva (malŝovinismo). *Grodnano.*

[1] Komentantoj klarigas, ke ĉe Marks tio estas konstato, sed ne signifas, ke la proletoj ne devas havi patrion, sed male ili batalu por ĝin konkeri. — *Red.*

Korektoj. Bonvolu legi en n-o 313, p. 1, tria kol., lin. 32 de supre: adaptiĝis (anst. adeptiĝis), pĝ. 4, lin. 5-a de l' felietono "komercaj" (anst. komceraj), pĝ. 5, 2-a kol., 5-a lin. de malsupre: "provis" (anst. pruvis).

FOR LA MASKOJN!

Sekve de la publikigo de ekstrakto el tre signifa protokolo de CK de SEU (vd. n-on 310 de "S-ulo") ni ricevis plurajn leterojn aŭ artikolojn, per kiuj ni konvinkiĝis, ke necesas denove priparoli iomete la demandon. Estiĝis eĉ duboj pri la aŭtentiko de l' dokumento. Nu, tiuj duboj estu for! La kulpigitoj mem ja ne neas la ekziston de tiu protokolo. Ili nur argumentas, ke ĝi estas neĝuste tradukita k ke la fakto, ke ni ne publikigis la tuton, aliigas ĝian veran signifon. Ni bone komprenas ilian kolereton pro tiu neantaŭvidita publikigo; ili sekve provas trovi ian ajn elturniĝon, sed vane...

Rilate la aserton pri neĝusta traduko, ni diru, ke nia informanto estas ruslingvano k perfekta esperantisto. Plie ni sciigu, ke pli poste ni ricevis duan tradukon, faritan de alia K-do, kiu ne konigis al ni sian nomon. Sed almenaŭ ni povis kompari la du tradukojn k konstati, ke la diferencoj estas nur stilaj; sekve la senco restas la sama. Por ke la legantoj povu juĝi mem, ni publikigas ĉi sube tiun duan tradukon k por forigi ĉian riproĉon pri tio, ke necesas koni la tuton por bone juĝi la signifon de la teksto, ni do forlasos el ĝi nenion. Ni eĉ publikigas la komenton, kiun aldonis nia informanto, tiel ke la legantoj konatiĝos kun la *tuta* dokumento. (Ili komprenos, ke, kvankam domaĝante la spacon en "S-ulo", ni estas devigataj defendi SAT-on kontraŭ insidaj atakoj.) La teksto de ni ricevita troviĝas nun en la manoj de la Kontrol-Komitato por esploro. Eble interesos ankaŭ la legantojn ekscii, ke tiu traduko estis sendita unue al germana K-do kun komisio transsendi ĝin al ni; tial ni ricevis ĝin pli malfrue ol la unuan, kiun ni publikigis en la n-o 310.

Ĉiu certe konsentos, ke tiu dokumento indas esti senpere konigata al ni. Kaj pri tio ni demandas: Kial do K-do Besler, membro de la Plenum-Komitato, kiu ĉeestis la kunsidon, ne informis nin, ne sendis al ni la senerarан tekston de tiu protokolo? Estis lia devo. Se tion li ne faris, se niaj kontraŭuloj tiom ekscitiĝas pro ĝia publikigo, tio estas *la plej bona pruvo, ke oni insidis al SAT*. Feliĉe, malgraŭ plej forta premo, estas tamen lojalaj SAT-anoj en Sovetio, kiuj riskis informi nin k ebligis, ke ni senmaskigu la malindan entreprenon. Alia pruvo, ke la tuta embusko estis *jam delonge preparata*, estas la fakto, ke komfrakcianoj per leteroj rekomendis al finlernintoj de esp-o, ke ili ne tuj aliĝu al SAT, sed atendu ĝis post la Londona Kongreso. Kaj sendube pro samaj motivoj K-doj Vildebrand k Besler, ekzemple, ne opiniis necese esti aktivaj membroj en SAT, ĉar ili ne abonas "S-ulo"n. Sekve K-do Vildebrand, la gvidinto de l' opozicio en Londono, ne devus havi tie la rajton opozicii k voĉdoni. De nun ni estos pli atentaj. La intrigantoj k subfosantoj devas scii, ke ni ne lasos nin superruzi, ke ni ne falos en iliajn kaptilojn.

La intrigo estas senmaskigita. Ĉiuj pripensemaj SAT-anoj havas la eblon prezenti al si klare la nunan situacion. Ili povas facile konvinkiĝi, ĉe kiu flanko oni "revizias" k "subfosas". Ni ne dubas, ke ĉiuj lojalaj k fervoraj K-doj, ĉu ili estas komunistoj aŭ ne, staros ĉe nia flanko, por ke SAT restu tia, kia ĝi estas ekde sia fondiĝo: *granda familio el ĉiutendencaj klaskonsciaj esperantistaj proletoj*. For la intrigojn k dogmojn! For la tendencbatalon el SAT! Vivu la frata kunlaborado de liberpensantaj homoj!

Direkcio de SAT.

Nur per grandskala varbado de abonantoj por "S-ulo"

ni povos baldaŭ kompensi la deficiton en nia buĝeto kaŭzitan pro nericevo de l' abonmono el Sovetio, k

reeldoni 12-paĝajn numerojn!

Citaĵo el protokolo N-o 20

pri kunsido de CK SEU 7. 8. 30.

Ĉeestis: sekretarioj Breslaŭ, Varankin, Demidjuk, Drezen, Incertov, Nekrasov, Usmanov, CK-anoj Javoronkov, Rublov, Kontrol-Komitatano de SEU Ponjatovskij, Moskva komitatano de SEU Jakovlev, reprezentantoj de GLEA Besler, Rihter.

Oni aŭskultis: 4) Pri situacio en SAT k pri lastaj elpaŝoj de SAT-direkcio en *Sennaciulo*. Estas ricevita el Londono la telegramo: "Londona Kongreso estas por XI. kongreso en Moskvo. Kontrolkomisiono kreiĝas en Bruselo. Por Lanti estas 119 voĉoj, kontraŭ — 59."

Oni decidis: 4 a) Konstati, ke propagandaj ideoj de sennaciismo k ĝenerala sinteno de SAT-direkcio lastatempe nur malutilis al laboro de SEU (elpaŝo de K-do Skripnik). Ĉi sennaciisman ideologion necesegas plej decide kontraŭbatali.

b) CK SEU indignite notas, ke inter sovetia esperantistaro troviĝis unuopuloj, elpaŝintaj sur paĝoj de *Sennaciulo* (n-o 304) kun aprobo al kontraŭsovetia agitado[1] flanke de SAT-gvidantoj. Anonima karaktero[2] de ĉi elpaŝoj ankoraŭ pli substrekas ilian kontraŭsovetian esencon. CK SEU alvokas lokajn organizojn de SEU k SAT stampi la agentojn de reformista alo, penetrintajn en la vicojn de sovetia esperanto-movado.

c) Konstati, ke decidoj de Londona Kongreso pri konfido al Lanti (119 kontraŭ 59) lasas la situacion streĉita k ne certigas, ke dum ajna momento nuna gvidantaro de SAT ne direktos siajn agojn kontraŭ USSR, komunistoj k SEU. Tiaj pozicioj de Lanti firmiĝas per tio, ke Kontrolkomisiono transitas al Bruselo, bazo de reformismaj Lantianoj[3].

d) Plenumi larĝan kampanion por batalo de malkonfido al Direkcio k Lanti dum ĝenerala voĉdono pri kongresaj decidoj, kio estas sola eliro ĉe la estiĝinta situacio.

e) Definitivajn organizajn decidojn pri kunlaboro kun SAT prokrasti ĝis efektivigo de la atentege kontrolota voĉdono aŭ ĝis rifuzo de la Direkcio aranĝi la voĉdonon[4]. Ĝis tiu tempo laŭeble repagadi SAT-ŝuldon[5], unuavice per eldono de konforma literaturo.

f) Proponi al GLEA[6] k al aliaj eksterlandaj laboristaj revoluciaj organizoj kreon de akcia societo por eldonado de revoluciaj esp. gazetoj k libroj, promesante ĉiel subteni ĉi eldonan iniciaton.

g) **Jam nun** *ne atendante oficialiĝon de la eldonejo* opinii necesa organizi ĉe GLEA specialan aparaton sufiĉe reklamatan por disvastigi eksterlande eldonojn k gazetojn de SEU.

h) Fari ĉion por ke en 1931 en Moskvo okazu internacia kongreso de revoluciaj esperantistoj por *oficialigi novan revolucian organizon.*

i) Ĉar SAT ĉesigis importon de siaj eldonoj al USSR, CK SEU estas devigita ne plenumi[7] paragrafon el rezolucio de Göteborga kongreso pri eldonado de esp. literaturo.

k) Opinii necesa, ke SEU-anoj, kiuj estas SAT-anoj, akurate plenumu siajn devojn al SAT k per tio evitu riproĉojn kontraŭ sovetiaj k komunistaj esperantistoj.

l) Konforme al deziresprimo de GLEA-reprezentantoj, por la unua tempo eldonon de nova gazeto anstataŭ *Sennaciulo* provi organizi en Moskvo. Redakti ankaŭ eksterlande. La redaktoro nomi K-don Batta.

Ĝen. Sekretario de CK SEU *Drezen.*

El rusa lingvo tradukis: *Iu el Moskvo.*

Ricevon de la informo jesu per "nia poŝto" en *Sennaciulo*. Mi tion sendas, por ke vi sciinte la planojn per via konduto faru ĉion eblan por konservi SAT-unuecon (pli vere unuecon de laborista esperantismo tutmonda). *Mi dubas, ĉu iu sovetia SAT-ano kuraĝos malkaŝe dum la kongreso en Moskvo elpaŝi kontraŭ Drezen.* Ne sendu al sovetianoj viajn leterojn en oficialaj kovertoj. *Iu el Moskvo.*

---

[1] *La legantoj rimarku, kiom stranga k aplomba estas tiu diro: ĉu senmaskigi intrigojn kontraŭ SAT estas agiti kontraŭ Sovetion? Ni opinias, ke ne, k neniu serioza homo povas identigi Sovetion kun la C. K. de SEU. Per nia senmaskigo ni havas la fortan konvinkon, ke tiel ni d e f e n d a s Sovetion.*

[2] *Pri tiu punkto oni trovu klarigon en la komento de nia korespondanto ĉe la fino de la dokumento.*

[3] *La legantoj bonvolu relegi pri tio nian komunikon en n-o 311 de "S-ulo" k ili decidu mem, ĉu tiu aserto havas ian fundamenton.*

[4] *Kompreneble okazos ĝenerala voĉdono pri la proponoj akceptitaj ĉe la Londona Kongreso, kiuj temas pri ŝanĝoj en la Statuto. Tiel okazas ĉiujare k ni havas nenian motivon por ne agi same ĉi tiun jaron.*

[5] *Precipe pro la nepublikigo de tiu punkto en la n-o 310 de "S-ulo" la kulpigitoj protestas. Sed ilia ŝajnindigno ne povas ne veki ridemon ĉe tiuj, kiuj pensas. Ĉu do estas heroaĵo nepre diskoniginda la simpla p r o m e s o pagi ŝuldojn?*

[6] *Kiel pruvon, ke la tuta afero estis jam delonge aranĝita, ni konigu al la Legantaro jenan fakton tre signifan: Post la Kongreso la Londona Klubo organizis kunvenon kun parolado de K-do Lanti. Dum tiu kunveno okazis debato k K-do Holt por defendi sian tezon, kiu konsistis en tio, ke LEA ĉesu ekzisti, s e n p r i p e n s e raportis dirojn de la nuna prezidanto de GLEA, K-do Vildebrand, eldiritajn sendube ĉe kunsido de la Komfrakcio. Jen ili estas: "GLEA tute ne intencas obei la Konvencion de Göteborg k pretas eldoni mem esp-lingvajn verkojn."*

[7] *Fakte neniam SEU tute plenumis tiun paragrafon: ni ja devis siatempe protesti kontraŭ la eldono de "Teorio de Esperanto" (de Varankin) — tute ne parolante pri la "Komunista Biblioteko".*

TRA ESPERANTIO

INTER NI

— Ĉu la ideoj ĉiam naskiĝas el la materio? Tion mi ne kredas . . . Se oni detruas la cerbojn, kiuj portas ideojn, ĉi-lastaj pro tio ne mortis; ili pluekzistas . . .[1]

— Neniam ĝis nun iu ajn povis konstati la ekziston de ideoj, kiuj ne rezultus el funkcianta cerbo. Kaj ŝajnas, ke cerbo estas io materia, ĉu ne? Ĉu nia K-do opinias kiel Platono, ke la Ideoj ekzistas en si k sidas ie en la sino de la Eternulo? Ĉu kiel la fama greka filozofo li kredas, ke ili estas la eternaj tipoj de ĉio, kio en surtera mondo estas ŝanĝiĝanta k pereanta? Estas ja permeseble sen risko esti konsiderata kiel stultulo havi tian kredon, ĉar Platono ĝin havis k estas ankoraŭ nuntempe konsiderata kiel plej profundpensa filozofo.

Sed mi tenas min ĉe la simpla saĝo k ne volas erarvagi en subtilajn metafizikaĵojn.

Jen vidu ĉi tiun lignaĵiston; li penadas kunigi tabulojn por fari tablon. Tiucele li devas ebenigi tiujn tabulojn. Tion farante li akiras i d e o n *pri ebeno. Se tiu sama laboristo estas iom pripensema, li certe konstatas, ke en sia hejmo mankas komfortaĵoj, dum li konstruadas luksaĵojn por homoj, kiuj kompense nenion utilan faras. Tio ne estas justa, li sendube pensas. Tiel li akiras ideon pri justo.*

Ni supozu, ke tiun laboriston oni mortigas; nu, aliaj homoj same penante ebenigi aĵojn ankaŭ akiros la ideon pri ebeno. Kaj se ili estas same proletoj, la konstato pri maljustaĵoj, kiujn ili suferas, naskos en ilia cerbo la ideon pri justo.

Klara k facile komprenebla afero! Sed mi rezignas kompreni la klarigojn de Platono k de aliaj malpli famaj ideistoj . . .

Sed ni atentu: la ideo pri justo restas vere tro . . . platona, t. e. tro abstrakta en la cerbo de la granda plimulto da homoj. Milionuloj tre sincere opinias justa la fakton, ke ili posedas tiom da riĉaĵoj; k multaj mizeruloj sentas nur envion al la riĉuloj; volonte ili konsentus esti mem milonuloj, se la bonŝanco permesus.

En la diskutata "Inter Ni" mi parolis pri la "forto de ideoj" k agnoskis ĝin. Sekve mi ne kontraŭus al tio, ke oni faru ian miton el ideo kapabla unuecigi mondskale la spiritojn. La justo povas esti unu el tiuj ideoj. Ĉu tion celas nia K-do? Kredeble jes, k mi ne volas uzi favoran okazon por moketi lian ideismon.

Se la ideo pri ebeno ne ekzistas en si, tio ja ne gravas, se sufiĉe da lertaj metiistoj kapablas fari ebenaĵojn, same direble pri justo, se sufiĉe da homoj pretas efektivigi justan sociordon. Estas eĉ tre bone, se ili sentus sin morale k forte devigataj agadi juste. Jam delonge iu fama moralisto, kies nomon nun mi ne memoras, diris, ke maljustaĵo farita al unu sola homo estas minaco al ĉiuj. Oni sekve povas pravigi la neceson agi juste eĉ je pure egoisma, materialisma vidpunkto.

E. L.

[1] Komparu "Inter Ni" en n-o 309 de "S-ulo".

"S-ulo" plej ĝuste informas

Ĉar mi nun troviĝas en hospitalo, mi nur malfruigite eksciis pri respondo de Majnca K-do[1] je mia artikolo pri "La rolo de sugesto en klasbatalo" (vd. n-on 303). Mi raportis, ke okaze de la "liberiĝo" de l' Rejnlando oni en Majnc anstataŭis la monumenton de la fama poeto Ŝiler per liberiĝmonumento. Ankaŭ mi aldonis bildon, montrantan la translokigon de la Ŝiler-monumento. La sciigon k la bildon mi elprenis el la Viena socialisma gazeto "La Vespero" (*Der Abend*), kiu skizis la fakton kiel ŝovinisman agadon. La Majnca K-do nun klarigas, ke la forigo de l' Ŝiler-monumento okazis tial, ĉar oni destinis pli bone situantan lokon por ĝi. La K-do opinias, ke mi ne profunde informiĝis pri tiu afero, sed mi ja ne havis motivon pridubi la ilustritan raporton de la Viena gazeto. Komprenеble Majncano povas esti pli detale informita pri tiu okazintaĵo. Entute oni ekkonas la avantaĝon de nia "S-ulo", kiu per rektaj komunikoj de la Gek-doj *plej korekte* informadas k ankaŭ superas la nacilingvan socialisman gazetaron.

F. S. (16 362).

[1] Vd. n-on 305/6.

MARISTOJ KAJ ESPERANTO

Arĥangelsk estas la plej granda ligno-eksporta haveno en USSR. Centoj da diversnaciaj ŝipoj vizitis nin ĉiujare. Dum la ŝipirado en 1930 staris ĉe debordiĝejoj de niaj segfabrikoj sume pli ol 500 ŝipoj. Sed por mi la plej konata nomo estas tiu de holanda ŝipo "Leersum", ĉar sur ĝi laboras karbtransportisto K-do *Verwijs*, SAT-ano 11 258 el Rotterdam, kun kiu mi havis esp. konversacion unuafojan en mia vivo.

Jam la trian fojon ĉi-jare tiu ŝipo vizitas nian havenon. Lastfoje mi renkontiĝis kun K-do V. okaze sur strato en Arĥangelsk. Mi unua rimarkis lian SAT-stelon sur la brusto, k post kelkaj minutoj ni estis amikoj, kvankam K-do Verwijs sciis ne unu vorton rusan, nek mi holandan. Lingvaj baroj kvazaŭ ne ekzistis. Nia nacia deveno estis forgesita. Ni reciproke ricevis multajn informojn, kiujn ne eblas trovi aliel. Vespere mi kondukis la K-don en cirkon, poste en soci-manĝejon, maristan klubon ktp. Ĉie ni facile konversaciis esp-e k fine disiĝis kiel bonaj amikoj.

Rakontante tion mi nur havas solan celon montri al tutmonda maristaro valoron de esp-o. Kutime centoj da fremduloj en havenoj ne estas priservataj nur pro la diverslingveco. De nun en Arĥangelska Marista Klubo estas aranĝita esp-ista ĉambro, kiu havas celon i. a. interrilati kun ĉiuj maristaj kluboj en tutmondo. K-doj helpu nin!

A. Erjuĥin (9682), Arĥangelsk.

Kiel mi havigos al mi belajn ilustritajn plurkolorajn POŜTKARTOJN kiuj simboligas la idealon DE SAT ?

Serion de 5 tiaj artaj kartoj liveras kontraŭ pago de 0,50 mk. g.

Administracio de SAT, Leipzig O. 27.

AL LA SENNACIISTOJ!

Leginte en la n-o 310 de "S-ulo" la militdeklaron el Moskvo al la *sennaciismo*, mi konvinkiĝis, ke la sennaciistoj devas grupiĝi por defendi sian rajton minacatan. Se ni ne vigle kontraŭstaras al tiu minaco, okazos, ke en la organoj de SAT ni ne plu havos la rajton defendi nian propran vidpunkton, kiel tion povas fari ortodoksaj komunistoj aŭ socialistoj. Tial mi decidis iniciati la starigon de

Sennaciista Frakcio.

Kun la helpo de aliaj K-doj mi preparos projekton de programo, kiun mi sendos al la petontoj. Nun mi vokas al la K-doj, kiuj aprobas la 3 ĉi-subajn principojn, ke ili bonvolu sendi al mi sian nomon, adreson, SAT-matrikulon.

1. Agnoski la klasbatalon — 2. Agnoski, ke artefarita lingvo (esperanto) fariĝu la tutmonda *unika* kulturlingvo k ne nur helpa kiel deziras la internaciistoj. — 3. Agnoski, ke la proletaj *esperantistoj* havas nenian intereson k profiton iel ajn partopreni libervole nacimilitojn. Ĉion rilatan al la "Sennaciista Frakcio" sendu al la provizora sekretario: Theodore Weder (1307), 24—29 Merchant Str., Astoria, N. Y., Usono.

RADIO — MOSKVO

Dum *oktobro* la esp. disaŭdigoj pri div. temoj el Moskva radiostacio je nomo de VCSPS (Tutsov. Centra Inter-sind. Konsilantaro) okazas *ĉiusabate* je 21,30 h. laŭ MET (23,30 h. laŭ Moskva somera tempo). Ondlongo 1304 m, frekvenco 230 kilocikloj. Pri aŭdeblo k impresoj aŭskultantoj nepre informu la stacion (Moskvo, Solanka 12, Dvorec Truda), ĉar de tio dependas okazigo de pluaj esp. disaŭdigoj.

V. Polakov.

ĈE LA NEŬTRALULOJ

La 15-an Kongreson de Italaj esp-istoj (30. 8. ĝis 2. 9. en Como) partoprenis krom reprezentantoj de ĉiuj italaj grupoj 34 eksterlandanoj. La Turisma Itala Ŝtata organizo prizorgis la turisman parton. I. a. reprezentanto de la registaro (vicprefekto), la vicurbestro k. a. lokaj aŭtoritatuloj salutis la kongreson persone, la itala kronprinco k ministro de l' edukado telegrame.

*

Skota esp. kongreso okazis de 5. ĝis 7. IX. en Dundee. La direktoro de edukado k prezidanto de Eduka Komitato de l' urbo promesis faciligi la enkondukon de esp-o en la lernejoj.

TRA LA MOVADO

KRONIKO

Francio. *Sisteron.* La kursoj gvidataj de K-do Bernard okazas dufoje semajne ĉe la urbdomo. Estas 50 esp-istoj ĉi tie (4 SAT-anoj). Multaj fremdaj esp-istoj vizitis nin, ankaŭ du aŭstriaj SAT-anoj, kiuj estis frate akceptataj. Pro SAT-aferoj turnu vin al K-do V. Vignet, Villa Zamenhof, Sisteron, B.-A. *Vallauris.* La lab. grupo propagandis sukcese ĉe "Amikoj de Sovetio". SAT-ano estas elektita kiel delegito por vojaĝo al USSR. Ĉe kampara festo aktive partoprenis la grupo per ekspozicio, kantoj ktp.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Prof. D-ro Herm. Nothnagel, La Mortado. Publika parolado eldirita en Wien la 25. 3. 1900. El germ. trad. Bernh. Selzer. Form. 15×22 cm. 27 pĝ. Prezo: 1 mk. g. Eld. Esperanto-Societo "Progreso", Ettenreichgasse 4/31, *Wien X.*

La aŭtoro pritraktas en popularscienca formo sur materialisma bazo la fenomenon de l' mortado, konstatas, ke la scienco ankoraŭ ne elkovris la internan esencon de tiu okazaĵo, esploras multajn kazojn k konkludas, ke la mortado plej ofte ne estas fizike turmenta. Tute leginda broŝuro.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Der Volkslehrer, Langensalza, 14. 9., pri eduklab. konf. en Lond. (308).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Signalen, Stockh., 18. 9., 25. 9., *Der Eisenbahner,* Wien, 5. 9., *D. Deutsche Eisenbahner,* Berl., 21. 9., *Le Réveil Ouvrier,* Nancy, 17. 9., 20. 9., 24. 9., 27. 9., *Leipziger Lehrerztg.,* 17. 9., *Le Populaire,* Paris, 1. 10. (esp. k lab. sporto).

Pri SAT-Kongreso raportis:

Le Travailleur Alpin, Grenoble, 6. 9., *Vorwärts,* Novjorko, 13. 9., *L'Humanité,* Metz, 17. 9.

Peresper. materialon enpresis:

L'Eclaireur de l'Ain, Oyonnax, 7. 9., *Daily Worker,* Novjorko, 31. 7., 9. 8., 6. 9., *Young Worker,* Novj., 21. 7. (sen mencio de deveno), *Vojovniĉij Bezvirnik,* Kiev, 6. 9., 25. 9. (ankaŭ alvokoj k agitvortoj en esp-o al eksterl. sendiuloj).

NIA POŜTO

601. — Tro malfrue sendita por okt. Sed en novembra "L. L." speciale bonvena.

13 885. — Viaj du artikoloj, kiuj entenas pli da konsideroj ol da faktoj, povos aperi nur, se la spaco permesas. La versaĵojn ni uzos je konvena tempo. *Red.*

15 146. — Ankoraŭ pagenda estas 47,50 fr. fr. *Adm.*

NEKROLOGO

La 24. julio mortis post trijara pulmmalsano nia fervora K-do

Willi Baltrusch (4629)

en aĝo de 26 jaroj. — Honoron al lia memoro!

SAT-rondo Bielefeld.

KORESPONDADO

AŬSTRIO

K-do Hans Scherleitner, *Zeltweg 44,* kĉl, PM, PI. Resp. garantiata.

— Kiu K-do povas havigi al mi n-on 1 (61), 1928 de "La Nova Epoko". Rekompenco laŭ deziro. Antaŭan dankon! Adr.: K-do Jos. Edelsbrunner, Lindengasse 1, Andritz, *Graz.*

GERMANIO

K-do Karl Müller (16 jara), Riessner Str. n-o 3, Chemnitz, pri ĉ. temoj kun junuloj el ĉ. landoj.

K-do Gerhard Beyer, Rathenower Str. 29, *Berlin NW 21,* kĉl, pri ĉ. temoj, pref. kun socialistoj.

HISPANIO

— Por ekspozicio ni petas el ĉl. PK, PI, esp-aĵojn, gaz., murgaz. ktp. Ni rekompencos per PI. Adr.: Esperanto Grupo, *Baracaldo.*

K-do Esteban Latorre, str. Assahonadors 12-4-1a, *Barcelona,* kĉl, L, PK, PI esp. k hispane, Ĉiam resp.

NEDERLANDO

K-do F. George Krooder, Pieter Nieuwlandstr. 86, HS, *Amsterdam,* pri ĉ. temoj, kĉl, L, PK, PI.

K-do J. van Briemen, Emmastr. 8, *Lisse,* pri vivcirkonstancoj, stato de sindikat-movado de terlab.- k kulturistoj por uzi la materialon en sindikata gaz., L, kĉl.

K-do L. Pinto, Dintelstr. 54/II., *Amsterdam-Zuid,* PM kun kolektantoj de poŝtmarkoj ĉl.

SOVETIO

K-do Ivan Pavlov, 8 proezd dom 22, kv. 1, *Moskvo — 18,* kĉl, pri ĉ. temoj, PI, PK, L. Tuja resp. garantiata.

Adresŝanĝo. — K-do Lorenco Piroĵnikov nun loĝas en *Moskvo, 55,* Novoslobodskaja ul. 33, kv. 20. (Antaŭe en Kerĉ). Gek-doj daŭrigu la koresp-adon!

— Viglan korespondadon garantias 150 gestudentoj pri ĉ. t. kĉl. Adr.: Ukrainio, *Kremenĉug,* Pedagogia Teknikumo.

ATENTU FRANCIANOJ!

Volante elmigri al Francio mi petas fr. gesamideanojn garantii kaj havigi al mi laborkontrakton, por ke mi povu ricevi pasporton. Dankon anticipan! Adr.: Francisko Papp, ŝuisto, Szoluok dzp *Czibakhaza* (Hungario).

ISK

Organo de Internacio de Socialista Kunbatalo (ISK)

Esperantlingva

Aperas kvaronjare
Abono pojare 2.– sv. fr.
Provekzempl. vi ricevos senpage de

"ISK"-Expedition, Nikolausbergerweg 67, Göttingen (Germ.)

"ISK" pritraktas aktualajn problemojn de l' internacia klasbatalo

"ISK" estas libera tribuno de ĉiuj seriozaj batalantoj por la seneksplutata socio

"ISK" estas la sola esperantlingva revuo oficiale eldonita de politika partio laborista

"ISK" montras la vojon al unuigo de l' tutmonda laboristaro alvokante al objektiva traktado de la politikaj problemoj

Tial abonu kaj subtenu per tio nian revuon "ISK"!

ENHAVO

	pago
Kio okazos en Germanio	17—18
Karlo Marks pri Hindio	18—20
Memoro je la 15-a de julio en Vieno	19—20
La klasbatalo tra la mondo	20—21
Ni virinoj k la modo	21
Se vi estus riĉulo...?	21
Babilono filozofa	21
Lingva demando por komencantoj	21
For la maskojn!	22
Tra Esperantio	23—24
Korespondado	24

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)